# Novjorka Prismo

Numero 100 Januaro 2001

*La Esperanto-Societo de Novjorko*
*kore invitas vin al sia januara kunveno*

DATO: Vendredon, la 19-an de januaro 2001, 6:30 ptm

LOKO: United Federation of Teachers
260 Park Avenue South (20th/21st Streets), NYC
(check schedule in lobby for room number)

PROGRAMO: 6:30 – Babilado kaj refreŝigaĵoj

**7:00 – Enigmo-Konkurso gvidota de Rochelle F. Grossman** ★

## Jam 100 numeroj de Novjorka Prismo!

Bonvenon al numero 100 de nia bulteno. En la unua, 'prova' numero de tiu ĉi bulteno, septembro 1990, la redaktoroj petis la legantojn *pripensi kiel kaj kion vi povas kontribui al via eldonaĵo.* Ŝajnas, ke oni bone pripensis, ĉar dum la pasinta jardeko oni kontribuis pli ol 1,000 verkojn tre diversajn: anoncojn kaj raportojn, rakontojn, poemojn kaj kantojn, artojn kaj fotojn, ktp. La kontribuaĵoj foje estis 'la sama la samaj' sed foje ili estis lertaj, amuzaj, interesaj kaj informoplenaj. La pasinta jardeko devas esti la plej bone dokumentata de ESNY, kaj eble de iu ajn loka E-grupo.




Tom Eccardt zorgeme kolektis ĉiun numeron de nia bulteno,kaj per sia Prismaro preparis por ni bonegon historion de nia klubo dum la pasintaj dek jaroj.

Dum la okdekaj jaroj ni ofte diskutis, sed ĉiam prokrastis, pri krei kluban eldonaĵon. Inter aliaj unuaj instigantoj estis Nick Tullero, kiu je preskaŭ ĉiu kunveno anoncis, ke *nia klubo bezonas bultenon*. Li eĉ preparis kelkajn malnetojn kaj donis proponojn pri la formo, kelkaj el kiuj kontribuis al la fina formo. Ekzemple: ni ĉiam lasas pli grandan 'enternan' marĝenon, por ke oni facile kolektu la numerojn en bindaĵo sen kaŝi/detrui la enhavon.


Estis pluraj proponoj pri la nomo, i.a., *Bulteno, La Granda Pomo,* kaj *La Pomego*. Dank' al Julius Balbin, ni decidis ne doni urbonomon al la bulteno, kaj ni elektis la proponon de Julius: *Novjorka Prismo*.

Mi mem ege ĝuas kontribui al ESNY per redakti ĝian bulteno – kaj mi dankas la Societon pro la interesa posteno. La produktado de *Prismo* sekvis pli malpli la evoluon de komputiloj mem. Ĝi naskiĝis el la DTP (skribtabla eldonado) 'revolucio' je la fino de la 80-aj jaroj, kaj eniris la Interreton en jauaro 1996, unu tagon antaŭ la *New York Times* komencis sian propran TTT-ejon. En 1990 ni devis entajpi ĉiun artikolon kaj speciale prepari la fotojn ĉe profesia fotisto. En 2001 preskaŭ ĉiu artikolo alvenas per e-poŝto, kaj la fotojn ni enmetas per skanilo, se ili ankaŭ ne venas e-poŝte. En la estonteco, eble Prismo ekzistos nur Interrete, kaj ĉiuj legos ĝin per iu ŝimpla poŝ-aparato.




*Novjorka Prismo* estas kreaĵo de nia tuta Societo, kaj mi volas danki al ĉiuj, kiuj helpis kaj kontribuis dum tiuj unuaj cent numeroj. Ni multon ŝuldas al nia desegnistino, Mary Pulley, kies talenta mano plibeligis ĉiun numeron de *Prismo* – pro ŝi, nia bulteno havis sian propran, unikan, kaj belan aspekton. Mi aparte dankegas miajn du kunredaktorojn Tom Eccardt kaj Nancee Medrano. Ili ambaŭ provlegis, konsilis pri kaj kontribuis al ĉiu numero. Sen iliaj laboro, sperto, perspektivo (kaj pacienco), *Novjorka Prismo* tute ne estus tio, kio ĝi estas!

Okaze de la jubileo de *Novjorka Prismo*, mia filino Rebecca ĵus lastatempe mem-lernis kalkuli ĝis cent en Esperanto! Nun ŝi praktikas kalkuli ĝis mil! Ho! Mi ne certas ĉu *Novjorka Prismo* povos daŭri ĝis 2091. Tamen, oni neniam scias. ★




– *Jim MEDRANO*

## Enigmo-konkurso


En januaro ni okazigos enigmo-konkurson. Ĉiu ĉeestanto kunportu al la kunveno enigmon en Esperanto. La enigmo povas esti ia ajn, sed preferinde ĝi ne temu pri la angla. Ĉiuj, kiuj kunportas enigmon ricevos unu poenton kaj legos ĝin al la ĉeestantoj. La homo, kiu unue ĝuste solvas la enigmon gajnos unu poenton. Post legado de ĉiuj enigmoj, tiu, kiu havas la plej altan kvanton da poentoj gajnos. La gajnonto povos elekti inter *Plena Ilustrita Vortaro* kaj *Plena Analiza Gramatiko* kiel premio. Ekzemplo de enigmo: *Sen mi kaj miaj kvar gefratoj estus ĉirkaŭ vi nur la nenieco. Kiuj ni estas?*

★ Respondo: *la kvin homaj sensoj.*

– *Tom ECCARDT*

## Firmaj decidoj por 2001


La subaj firmaj decidoj restas valoraj kaj taŭgaj, 10 jaroj post ilia apero en *Prismo* 4! ★



Firmaj Decidoj por 1991
de Nancee Medrano

1. Mi iros al Miss Kim's la unuan vendredon de ĉiu monato.
2. Mi korespondos kun samideano en alia lando.
3. Mi verkos artikolon por la Novjorka Prismo.
4. Mi pagos mian kotizon.
5. Mi informos miajn amikojn pri la novaj Esperanto-klasoj ĉe Stuyvesant Adult Education Center.
6. Mi faros prelegon por la Societo.
7. Mi aliĝos al ELNA kaj UEA.
8. Mi desegnos butonon por la Societo.
9. Mi lernos la vortojn de "La Espero."
10. Mi legos "Vivo de Zamenhof."
11. Mi...

# La Zamenhofa Festo de la 15-a de decembro 2000



Laŭ mia opinio, la ĉijara Zamenhofa Festo sukcesis kiel neniam antaŭe! Ni havis entute 33 ĉeestantojn, multaj el ili gastoj kaj neofte ĉeestantaj membroj.

Michael LEWY el Bostono estis akompanata de Jacob SCHWARTZ. Mi vidis Allen FEINBERG el Novjerzio la unuan fojon ekde naŭ jaroj. Maurice WITTENBERG ĉeestis, kaj ankaŭ Irene GINSBERG, kiu ĵus komencis karieron kiel advokato. La tuta familio MEDRANO ĉeestis, akompanata de Constanza ARMES CRUZ, la plej amata amikino de Beka, kiu nun havas ok jarojn. Alfredo kaj Tomoko kunportis sian filinon!



*Tom.*

Susan KOHN anoncis la novan liston de estraranoj por la venonta jaro. Ĝi samas kiel la nuna estraro, kun du esceptoj: Tomaso LEONG estos nia nova vicprezidanto, kaj Susan KOHN estos nia nova programdirektorino. Ili du aldonos multan energion al la estraro de nia klubo. Kiel kutime, oni donis al la ĉeestantaj membroj la okazon proponi aliajn kandidatojn por la estraraj postenoj, sed neniu aldonis al la listo de la kandidatiga komitato, do la personoj de la listo estis akceptataj kiel la estraro de la venonta jaro.

Tomaso ECCARDT donis mallongan prelegon pri la estimata kreinto de nia lingvo, Doktoro Ludoviko Zamenhof. Oni anoncis, ke la tago de nia festo, la 15-a de decembro, estis ankaŭ la ekzakta naskiĝtago de Zamenhof. Bedaŭrinde, mi devas menciI, ke je la momento de tiu anonco, la dato en Bialistoko estis jam la 16-a.



*Irene, Susan kaj Nancee.*



*Ŝijimin ĉe la piano.*

La loko de la festo estis same kiel lastmonate, ĉe la UFTa konstruaĵo je 49 E. 21-a ŝtrato, je la kvara etaĝo. Tomaso skribis la vortojn de la kanto *Ho, Zamenhof* sur la skribtabulon de la ĉambro, kaj la grupo kantis ĝin laŭ la melodio de *Oh Christmas Tree* aŭ *O Tanenbaum*. ŜIJIMIN trovis pianon ĵus ekster la ĉambro, kaj kelkaj ĉeestantoj spertis aldonan muzikan momenton je la fino de la festo.



*Shep kaj Richard..*

Mi menciu, ke multaj personoj kunportis manĝaĵojn kaj trinkaĵojn, kiuj multe aldonis al la sukceso de la festo. Je la naŭa, Rochelle F. GROSSMAN ludis sian kutiman rolon kiel elirigantino, kaj la ĉeestantoj rapide purigis la ĉambron, kolektis siajn posedaĵojn, kaj foriris de la konstruaĵo kaj iris hejmen. ★

*Protokolis: Stuart GREEN*



*Gesinjoroj Fineberg.*



*Stuart protokolas.*



*Nijl kaj Arthur.*



*Rochelle kaj Marta.*



*Constanza, Beka kaj Emily sub tablo.*

# Sony Plaza

La 7-an de januaro, pli malpli 9 esperantistoj, inkluzive unu novulo, Thomas MORGAN, renkontiĝis ĉe Sony Plaza. Ni parolis pri la eklipso kristnaska, fremdlandaj edziĝfestoj, malmultekostaj gastejoj en Novjorko, kaj aliaj interesaj aferoj. ★

*– Tom ECCARDT*



# Kanto de la Libera Vojo

*Mi ĉiam reviziadas mian tradukon de ĉi tiu poemo, kaj jen la lasta (eble la fina!), kiel mia kontribuaĵo al la* Novjorka Prismo *de januaro 2001. Mi rigardas ĝin taŭga por la komenco de la nova jarmilo, ĉar ĝi priskribas komencon de nova, freŝa sinteno.* ★

*– Maurice WITTENBERG*

**Kanto de la Libera Vojo**

Surpiede kaj facilkore, mi ekiras la liberan vojon,
Sana, senĝena, kun la mondo antaŭ mi,
Kun la longa, bruna irejo antaŭ mi,
  kondukanta kien ajn mi elektas.
De nun mi ne petos feliĉon, mi mem estas feliĉo,

De nun mi ne plu ploretos, ne plu prokrastos,
  bezonos nenion,
Forkonfesinte endomajn ĝenojn, bibliotekojn,
  plendenajn kritikojn,
Forta kaj kontenta, mi vojaĝas la liberan vojon.

*Unua stanco de "Kanto de la Libera Vojo" de Walt Whitman*

**Song of the Open Road**

Afoot and lighthearted I take to the open road,
Healthy, free, the world before me,
The long brown path before me
  leading wherever I choose.
Henceforth I ask not good-fortune, I myself am good-fortune,

Henceforth I whimper no more, postpone no more,
  need nothing,
Done with indoor complaints, libraries,
  querulous criticisms,
Strong and content, I travel the open road.

*First stanza of "Song of the Open Road" by Walt Whitman*

# Esperanta observado

*Mi verkis ĉi tiun artikolon por la AEK Bulteno (elektronika bulteno de la Astronomia Esperantista Klubo), sed ĝi ankaŭ temas pri Novjorko kaj mi adaptis ĝin por nia* Novjorka Prismo.


*Feliĉan Novan Jarmilon!*

En la Interreto esperantistoj povas partopreni en la Astronomia Esperantista Klubo. La AEK eldonas almanakon pri astronomio kaj astronomiaj eventoj, havas ret-paĝon kaj elsendas periode e-poŝtan bultenon. Se vi volas partopreni aŭ membriĝi, sendu e-poŝtan mesaĝon al Alex Mikishev ĉe <mikisal@inverness.co.il>. Eĉ en nia forte lumita urbo, la ĉielo povas doni suprizojn. Novjorko estas ankaŭ la hejmo de tre moderna astronomiocentro – legu sube!

Kompreneble, la urbo Novjorko ne estas bona loko por vidi la stelojn, sed ĉe la ROSE CENTER FOR EARTH AND SPACE (La Centro 'Rose' pri Tero kaj Spaco) oni povas vidi ne nur puran steloplenan ĉielon, sed ankaŭ virtuale vojaĝi tra la Kosmo.

La Centro Rose enhavas la Hayden Planetarium kaj estas flanko de la American Museum of Natural History. Antaŭ pli ol unu jaro, la Hayden Planetarium estis tute renovigita kaj iĝis la Centro Rose. Oni malfermis la pordojn kun granda fanfaro, kaj oni devis antaŭmendi biletojn por la inaŭgura prezento en la nova planetario!

La inaŭgura prezento estas virtuala vojaĝo el la Tero, tra la Nebulozo en Oriono (por vidi la naskiĝlokon de novaj steloj) ĝis la limo de la observebla Kosmo. Nia "ĉiĉerono" tra la Kosmo estis la voĉo de la konata aktoro Tom Hanks. La projekcilo por montri la stelojn kaj aliajn bildojn en la domo estas tre aktuala komputila sistemo, kiu enhavas bildojn bazitajn sur tiuj el la Spaca Teleskopo Hubble. Oni sentas, ke oni mem flosas en la bela Nebulozo en Oriono!



Aliaj lokoj en la Centro Rose informas pri la Praeksplodo, la historio de la Kosmo (oni "piediras" el la Praeksplodo ĝis la Nuno), pri nigraj truoj, kaj pri multe pli. Oni ankaŭ povas vidi modelojn de la skalo de grandeco en la Kosmo, el la plej grandaj grupoj de galaksioj ĝis sub-atomaj partikloj.

La Centro Rose havas aktivan edukan programon por malfermi la okulojn de junuloj kaj reklamas ĉe bibilotekoj kaj lernejoj.

Ŝajnas, ke la Centro ofertas siajn programojn nur en la angla, sed mi esperas, ke aliaj lingvoj sekvos. Malgraŭ tio, mi forte rekomendas la ROSE CENTER FOR EARTH AND SPACE al ĉiuj, kiuj interesiĝas pri la Kosmo kaj ŝatas rigardi la stelojn.

La Kosmo mem donis al novjorkanoj kaj loĝantoj de Nord-ameriko kristnaskan donacon! Videbla en tre klara ĉielo estis parta eklipso de la suno je la 25-a de decembro 2000. Ĝi daŭris kelkajn horojn kaj en Novjorko, ĉirkaŭ 50% de la suna disko estis kovrata. La Centro Rose havis aldonan programon pri la eklipso kaj specialaj paperaj okulvitroj estis aĉeteblaj por spekti la sunon kaj eklipson sen danĝero. La loka amatora astronomia grupo en la urbo starigis teleskopan observejon en Central Park (Centra Parko) por montri la eklipson kaj iom eduki homojn en la parko. Laŭ loka gazeto, multaj ĝuis tiun okazon spekti naturan fenomenon dum la festotago.

Klarajn ĉielojn al ĉiuj en la nova Jarmilo! ★

*– Pam LIEBER*

## Pagintaj anoj de la Esperanto-Societo de Novjorko 2000

| | | | |
|---|---|---|---|
| Arlen Baden | Takaki Julian Hashimoto | Cécile Low | Douglas M. Rose |
| Lynn C. Bartlett | Helen Hasselriis | Eugene Markov | Mark Ryszewski |
| Marta L. Bergonzoli | Hortense Howell-Barber | David S. Mattis | Isolde Schehr |
| Nijl Blonstein | Booker Hutchinson | Beka Medrano | Janos Šipos |
| Arthur Bonetti | Pierre Jelenc | Emily Medrano | Sofiya Soskina |
| Milton Bonilla | Renata Kaczmarska | Jim Medrano | Bernard Stollman |
| David R. Brown | Alexander Karkovsky | Nancee Medrano | Witold Symonowicz |
| Semra Čelik | David Kobaladze | Laura Miller | Gloria C. Taylor |
| Richard F. Connell | Susan D. Kohn | Maria L. Murphy, MD | Arnold Victor |
| Leonard Dzelzitis | Ernest E. Kovary | William F. Orr | Shep Wahnon |
| Thomas M. Eccardt | Thomas Leong | Carlos E. Ortiz | Cindy Walpole |
| Adolph Fuerst | Martin L. Levine | Dan Perlman | Maurice J. Wittenberg |
| Louise Futran | Michael R. Lewy | Bill Pernell | Tomoko Yamashiro-Petrov |
| Margot H. Gerson | Pamela Lieber | Susan Polgar | Colin L. Yeh |
| Stuart M. Green | Jon Liechty | Mary Pulley | |
| Rochelle F. Grossman | Dragomir Livic | Lillian Rachele | **Sumo: 62** |

*Krome, 14 personoj aŭ grupoj abonis al* Novjorka Prismo. ★

# La lastaj dek jaroj de Esperanto-Societo de Novjorko

*de Thomas ECCARDT*




Mi havas kompletan kolekton de la 99 numeroj de *Novjorka Prismo*, do mi posedas historion de nia klubo dum la lastaj dek jaroj. Ĉar mi esperantistiĝis nur 3 jarojn antaŭ la komenco de *Primso*, ĝi reprezentas preskaŭ miajn ĉiujn spertojn en Esperantujo. Mi deziras dividi kelkajn el tiuj spertoj kun vi.

Esperanto-Societo de Novjorko sufiĉe multe transformiĝis dum la naŭdekaj jaroj. Ĝi estis 30-40 membra grupo en la okdekaj jaroj, kaj iĝis 60-70 membra grupo dum la naŭdekaj. Antaŭ la naŭdekaj jaroj, ESNY kunvenis nur 8 fojojn jare, nun ni kunvenas formale 9 fojojn, kaj neformale 15 fojojn. Krome ni disdonas informojn pri Esperanto en pluraj lokoj kaj okazoj. Antaŭ dek jaroj, tajpita kunveno-anonco kun protokolo estis sendata ĉiumonate, sed nun ni havas *Novjorkan Prismon*, kiu prezentas al ni novaĵojn, literaturaĵojn, bildojn, fotojn, komikaĵojn, ktp., en bela formato. Eble mi preterlasas kelkajn aspektojn de la okdekaj jaroj, kaj mi bedaŭras tion, tamen mi kredas, ke nia Societo travivis bonan jardekon.

**OFICISTOJ**

Dum la lastaj dek jaroj, 16 homoj estis oficistoj: Thomas Eccardt, Stuart Green, Rochelle F. Grossman, Renata Kaczmarska, Alex Karkovsky, Susan Kohn, Thomas Leong, Pamela Lieber, Cécile Low, Jim Medrano, Nancee Medrano, Lillian Rachele, Sofiya Soskina, Lydia Tabor, Arnold Victor, kaj Colin Yeh. Nur du estis konstante oficistoj, kaj nur unu estis ĉiam en la sama posteno. Du homoj okupis tri malsamajn postenojn dum la jardeko, aliaj du okupis entute du postenojn. En 1993, ekzistis ses oficialaj postenoj, en 1993 la nova statuto kreis novan postenon: redaktoro de la novaĵletero. Jim Medrano okupis tiun postenon ekde ĝia kreado.

**ESPERANTISTOJ DE LA JARO**

En januaro 1990, Mark Ryszewski ricevis la unuan premion "Esperantisto de la Jaro". Lia atingo estis revivigi Esperanto-klubon en Unuiĝintaj Nacioj. La aliaj gajnintoj estis: Jim Medrano, 1991, pro transformi la novaĵleteron en *Prismon*; Mary Pulley, 1992, pro ŝiaj bildoj, kiuj beligas *Prismon*; Thomas Eccardt, 1994, pro krei kaj elsendi esperanto-vidbendon per kabla televido; Nancee Medrano, 1995, pro gastigado kaj la rubriko *Laste Vizitis*; kaj Pam Lieber kaj Paul Lynch, 1996 pro malavara helpo kun la ELNA Jarkongreso en Novjorko en 1995. Mi bedaŭras, ke tiu premio, donata pro kreiva kontribuaĵo al la loka Esperanto-movado, malaperis – estus bonege revivigi ĝin.

**JARKONGRESO DE ELNA**

1995 certe estis granda jaro por nia Societo, ĉar ni okazigis en Novjorko la 43-an Jarkongreson de ELNA. Dum varma semajnfino de julio pli ol cent gesperantistoj kunvenis ĉe la oka etaĝo de Fashion Institute of Technology en Midtown. Ĉar estis la 50-a jarreveno de Unuiĝintaj Nacioj, la temo de la kongreso estis "La Valoro de Esperanto en Internaciaj Rilatoj."

Post 30 programeroj kaj distraj vesperoj, post-kongresa programo vizitis la vidindaĵojn de la Granda Pomo. Laŭ *Novjorka Prismo*, mi promesis, ke mi volonte organizos plian ELNA kongreson en 2005! Aŭ ĉu pli frue?

**REGIONAJ RENKONTIĜOJ**

Krom la ELNA kongreso, okazis aliaj grandaj Esperanto-renkontiĝoj en nia regiono. En 1991 karavano de novjorkanoj iris al la ELNA Jarkongreso en Norda Karolino. En 1991, komencis la somera Esperanto-kurso ĉe University of Hartford, kiu daŭris plurajn jarojn. En 1992, okazis trikluba kunveno en tiu universitato, en kio partoprenis la kluboj de Hartford, Bostono, kaj Novjorko. Ni intencis daŭrigi tiun-ĉi kunvenon je ĉiu somero, sed io interrompis ĝin. En 1994, Normando Fleury, kun helpo de lokaj kluboj de orientaj Usono kaj Kanado, organizis la unuan "Internacian Semajfinon Esperantistan", kiu okazis en skiripozejo Okemo, en Ludlow, Vermont. La unua ISE gastigis Marjorie Boulton, la kvaran, Claude Piron. Nun Okemo estas oktobra tradicio de ESNY, bona anstataŭo por la tri-kluba kunveno, ĉu ne? Julio 1998 donis al ni plian okazon vidi niajn kebekajn amikojn, kiam ELNA, KEA, KEJO, USEJ, kaj JEK kunvenis en Montrealo. Ni helpis organizi la kongreson.




**NI PERDIS ...**



Ĵus antaŭ la ELNA kongreso en Novjorko, ni perdis unu el niaj elstaraj membroj. Jozefo Delpino mortis en Londono, kie li kaj lia edzino libertempis. Jozefo estis mond-vojaĝanto, kiu revenis al Novjorko kaj partoprenis en multaj kunvenoj kaj interese prelegis. Dum la naŭdekaj jaroj, ESNY perdis eble ĝiajn plej gravajn membrojn, Elizabeth kaj Julius Manson. Betty mortis en majo 1993 kaj Julie en novembro 1998. Ili estis aktivuloj en UN, en ESNY, en Esperanto-instruado, en laborismo, en Etika Humanismo, ktp. Julie helpis starigi la kurson ĉe Stuyvesant Adult Center, kaj anstataŭigis Mark Starr kiam li mortis. Aliaj novjorkaj esperantistoj, kiujn ni perdis dum la lastaj dek jaroj estas: Moshe Lewin, 1990; Victor Pixley kaj Florence Steinberg, 1993; Bronia Wiecek, 1994; Henri Lurié, John Kailenta, kaj Mamie Joan Feingold, 1995; Sidney Steinberg kaj Michael Degenhardt, 1996; Salmon Helfgott kaj Milko Iliev, 1999. Nia klubo perdis alian aktivulon, en Septembro, 1998. Bonŝance, tamen, Lydia Tabor nur translokiĝis al Pollando, sia naskiĝloko.

**NI GAJNIS ...**




Du infaninoj naskiĝis kun ESNY-membreco antaŭ ol ili scipovis paroli: Rebecca Medrano naskiĝis en julio 1992, kaj Emily Medrano en julio 1998. Steve Mann ricevis novan filinon, Victoria, en aprilo 1993, kaj Colin Yeh ankaŭ ricevis filinon Crystal, en junio 1993. Kompreneble, esperantistoj estas farataj, ne naskataj. Parte dank' al la kurso, ni ricevas novajn membrojn ĉiujare. Nur 28 el la 60 ESNY klubanoj en 1999 estis membroj en 1991.

**KURSOJ**

Dum la naŭdekaj jaroj, oni daŭrigis la kurson, kiun Julius Manson kaj Mark Starr fondis. Inter la instruistoj estis Jozefo Delpino, Leonardo Dzelzitis, Thomas Eccardt, Julius Manson, kaj Jim Medrano. En aŭgusto 1997, Stuyvesant Adult Center informis al ni, ke ili ne plu provizos klasĉambron por ni. Ni publikigis tion en Prismo en septembro, Julius Manson legis pri tio, kaj tuj telefonis al la centro. Post iom da disputo, li "konvinkis" Dr. Fromm, ke li

ja havas spacon por ni. Ni ankoraŭ instruas Esperanton tie dum tri semestroj jare. Antaŭ kelkaj jaroj, mi instruis Esperanton ĉe la gej-komunuma centro, poste Arnold Victor daŭrigis la instruadon. Nick Farinacci instruis Esperanton en Queens. Ĉiun alian semajnon mi gvidas konversacian rondon je merkredo en Bradlee's ĉe Union Square. Mi ĵus aŭdis, ke Bradlee's bankrotis, do ni devos trovi alian restoracion, ĉar ni volas daŭrigi tiun-ĉi kelkjaran tradicion.



## TRADICIOJ

Ĉiujare, la kalendaro de ESNY estas plena je okazaĵoj. Multe el tiuj "tradicioj" komenciĝis fakte dum la lastaj dek jaroj. Originale, nia Zamenhofa Festo okazis la vesperon de la jara konferenco de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo (CED) kaj Traduka Departamento de UN. UEA patronis tiun feston ĉe 777 United Nations Plaza. En 1993, kiam oni movis la daton de la konferenco al la printempo, ni movis la feston al UFT, kaj invitis niajn membrojn kunporti kaj dividi manĝaĵojn. Nun ĝi estas ankaŭ oficiala klubkunveno por findecidi pri la oficistoj de la nova jaro. En 1991, Nancee Medrano proponis, ke ni malfermu la pordojn de nia klubo al ne-esperantistoj. Ĉiujare, dum la aŭtuno, ni uzas la okazon de nia Malfermita Domo por inviti konatulojn kaj studantojn por lerni pri Esperanto kaj pri nia klubo.

Komence de 1992, ESNY iasence translokiĝis eksteren. En majo 1992, la unuan fojon ni starigis tablon ĉe la "pul-merkato"

## NEFORMALAJ KUNVENOJ

La someron de 1991 la unuan fojon okazis plena horaro da eksteraj renkontiĝoj. La antaŭan jaron, ni okazigis nur du, kaj antaŭ tio, ESNY entute ne kunvenis dum la somero. Kvankam malpli multe da homoj ĉeestas dum somero, almenaŭ tiuj, kiuj ne vojaĝas al kongresoj povas sperti iom da esperantujo. Verŝajne iam dum 1990, societanoj komencis iri al najbara restoracio *Miss Kim's* post vendredaj kunvenoj por daŭrigi la konversaciojn. De tiu nova kutimo venis la ideo kunveni neformale la unuan vendredon de ĉiu monato, vespere ĉe Miss Kim's, kvankam ne estis formala kunveno. Nuntempe Miss Kim's nomiĝas *My Cousin Vinny's*. Ekde novembro 1991, ni decidis neformale renkontiĝi posttagmeze, la unuan dimanĉon en A&S Plaza. En aprilo 1995, ni malkovris la publikan spacon ĉe Sony Plaza, kiu estas pli mallaŭta kaj pli taŭga por konversacio. Ni ankaŭ uzas Sony Plaza por estraraj kunsidoj.

SONY PLAZA




## PRELEGOJ

Kio pri la formalaj kunvenoj? Komence de septembro 1992, UFT donis al ni ĉambron en malsama konstruaĵo, do la adreso ŝanĝiĝis de 48 East 21st Street al 260 Park Avenue South. Niaj lastaj du kunvenoj okazis denove en 21-a strato. Dum dek jaroj kompreneble ĉe niaj kunvenoj estis dek Zamenhofaj/novjaraj festoj, dek malfermitaj domoj, kaj dek raportoj pri la somer-


perantistoj, oni prezentis 3 teatraĵojn kaj 3 vidbendojn. Okazis unu debato, unu politika diskuto, kaj unu humora prelego. Mi mem dezirus pli da debatoj. Multaj prelegoj ne estas facile klasigeblaj: gastigado per Pasporta Servo; "Ĉi"-ekzercoj; Rio konferenco pri la natura medio; (science) skeptikuloj; epizodo en Dominikana Respubliko; mia kato — poligloto; paranojo kaj skizofrenio; genealogio; urbaj legendoj; komputiloj por Esperanto; kaj batalaj artoj. Mi esperas, ke tiu listo inspiros vin prelegi pri iu temo kiun vi konsideras interesa.

## GASTOJ

Kelkaj klubaj aferoj daŭris de pasintaj jaroj. Centoj da esperantistoj vizitis Novjorkon dum la naŭdekaj jaroj. Gesinjoroj Medrano, Nijl Blonstein kaj Thomas Eccardt, inter aliaj, gastigis kelkajn el ili en siaj hejmoj. Multaj gastoj vizitis la oficejon de UEA, kie Rochelle F. Grossman bonvenigis ilin kaj ofte invitis ilin al manĝo. Foje aliaj geesperantistoj ĉeestis. Kelkaj niaj gastoj prelegis ĉe klubkunveno



La malsupra duono estas difektita
The bottom half was damaged




Samideanoj sub tendo ĉe amana restoracio. Nijl sidiĝas inter Humphrey Tonkin kaj Renato Corsetti.

## Vizito al Jordanio 2000

Somere 2000 mi partoprenis en tri-taga renkontiĝo de esperantistoj en Amano, Jordanio pri la ĝenerala disvastiĝo de Esperanto en la araba mondo.

Unu tagon antaŭe mi flugis de Francio. Mi alvenis en Ben Gurion flughavenon, apud la urbo Lod, Israelo. Mi tranoktis tie atendante la unuan aŭtobuson al Jerusalemo por preni aŭtobuson ĝis Jordanio.

Oni vekis min. Iu en uniformo. Ĉu la policano venis forjeti min de tie, kie mi dormetis sub daktila arbo? Ne! Estis laboristo, kiu petis ludi mian gitaron. Okazis agrabla surprizo: *kumsitz* (kantorondo). Dek kvin laboristoj sidiĝis sur la subarba planko kaj kune kantis. Dudek ĝis dudek kvin jaruloj ili estis – duono de la grupo neniam antaŭe aŭdis pri Esperanto. La petanto bone ludis modernajn hebreajn kantojn, kaj ankaŭ mi ludis kaj kantis angle, hebree, kaj Esperante.



Kamal Chauchi prelegas apud fumilo 'narĝila'.

Mi telefonis al mia filino Vered de Jerusalemo kaj denove ĉe la landlimo per la populara telefon-karto (malofte eblas telefoni per moneroj ekster Usono). Ŝi estis ĉe sia avino en la urbo Aŝdod.

La trapaso ĉe la landlimo estis komplika – mi devis piediri, uzi taksion, kaj preni aŭtobuson dum eble 4 kilometroj – kaj poste dividi taksion inter 7 homoj dum la 30 kilometroj al Amano. Nur mi estis eksterlandano. Israelo postulis elir-pagon de kvardek dolarojn.

Mi sciis, ke grupoj de esperantistoj dormos ĉe la kvar-stela hotelo Meridien en la kvartalo Ŝamsani. Mi tamen ne kapablis elspezi tiom. Mi petis de loka taksiisto malmultekostan hotelon en la sama kvartalo. La hotelo Nefertiti estis perfekta por miaj bezonoj: $11 tage por privata ĉambro en la sama agrabla kvartalo, kun ombro de arboj, kaj dudek minutojn de la pli granda hotelo. En la taksio mi forgesis la starigilon de mia video-aparato. Feliĉe, la taksiisto revenis kun ĝi post kvin minutoj. Dankon!

Dum du tagoj mi piediris kaj piediris kaj piediris en la Amana regiono – dekoj da kilometroj. Unue mi trairis multajn riĉegajn kvartalojn, kun muzeoj kaj ambasadejoj. Poste mi trapasis malpli riĉajn kvartalojn. Mi rimarkis, ke multegaj homoj havas satelit-antenojn por ricevi televidon. Mi unue pensis, ke tiu estis indiko de okcidentiĝo, sed poste (dum kontraŭisraelaj novaĵraportoj) mi aŭdis, ke la antenoj estas multe uzataj por ricevi elsendojn religiajn/politikajn de neregistaraj grupoj en Saŭdi-arabio.

Ĉe la renkontiĝo estis pluraj aktivaj esperantistoj arabaj, tre agrablaj. Plej longe me parolis kun Wael Elmahdi. Li loĝis kun siaj gepatroj en Usono dum duono de la vivo. Li estas poligloto en la grandaj eŭropaj lingvoj. Krom esperante ni parolis hispane, france, germane, kaj angle. Li restas aktiva sur la Interreto <waelalmahdi@yahoo.com>. Li studas politikan sciencon ĉe la Universitato de Irbid, Jordanio. Li planas poste reveni al sia hejmlando, Bahreno.

Mi memoras longan konversacion en tradicia araba restoracio sub tendo. Nesra, Amana esperantistino, gvidis nian grupon de dudek esperantistoj tien.


Kamal Chauchi (Ŝaŭŝi) verkis france libron pri la mez-orienta, populara fumilo 'narĝila'. Li bone tradukis multajn paĝojn dum du hora prelego kun diapozitivoj.

Prelegis kelkaj eŭropanoj, kiuj loĝas inter araboj. Parolis Guy Pent el Francio, kiu baptis sian grandan jakton "Esperanto" en haveno apud Ŝarm Elseĥ, Egiptio. Mi mem parolis pri miaj kontaktoj kun arabaj esperantistoj en la mez-oriento. Eks-ministro de kulturo de Jordanio prelegis angle. Aliaj konataj prelegantojn estis Humphrey Tonkin, Renato Corsetti, kaj Atilio Rojas. Ĉio kaj ĉiu estis trankvilaj.

Monaton poste, kelkajn semajnojn post la U.K. en Tel-Avivo, multo ŝanĝiĝis. Kvankam la amana renkontiĝo rekomendis kunlaboron inter jordanaj kaj israelaj esperantistoj, iu araba esperantisto indikis (Interrete) grandan timon havi ian ajn kontakton inter jordanaj kaj israelaj esperantistoj. Mi eposĝtis, ke Esperanto estis bona pacigilo inter okcidento kaj oriento dum la 'malvarma milito'. Mi nuntempe opinias, ke sub granda manko de libera parol-rajto, demokratio, kaj egaleco en la araba mondo, eble oni ne povas havi tian kontakton. ★

– *Nijl BLONSTEIN*

## Ĉe hartondisto en Azerbajĝano



Kiel ni esperantistoj ja bone konstatas, foje tiom gravas la elekto de lingvo mem, kiom la dirataj vortoj. Dum mia antaŭ-lastjara vizito al la Respubliko de Azerbajĝano, mi spertis ĝuste tion. Meze de mia kvar-monata vizito, estis necese viziti la hartondiston. Amiko mia, kiu parolas bonege la rusan sed tute ne la azeran, informis min pri la afero. "Vi ja povos peti iun ajn hararanĝon," li diris, "sed vi nepre ricevos nur tiun, kiun ili volos doni al vi." La rusan lingvon ja parolas preskaŭ ĉiu en la azera ĉefurbo Baku, sed ne ĉiuj ŝatas ĝin, parte ĉar ne tro longe antaŭe, la urbon okupis la rusa armeo.


Iom timeme, do, mi eniris la hartondejon. Mian timemon ne helpis la tondisto, kies mallongaj frazoj ŝajne montris iom da ĝenateco. Kiam mi balbutis mian peton pri la aranĝo, li kompreneble demandis, ruslingve, ĉu mi parolis la rusan. Mi respondis nee, kaj strebis klarigi tion, kion mi deziris. Li eklaboris. La afero progresis iom malĝentile, sed post la fino mi devis konfesi ke mi ja ricevis ĝuste tion, kion mi petis. ★

– *Jon LIECHTY*

## Samideanoj en Spokane

En oktobro 2000 mi kaj mia patrino, Nobuko, vizitis ges-roj Bill kaj Erika Vathis, malnovaj esperantistoj en Spokane, Vaŝingtono. La foto montras ilin kun ilia filo Andy (ne esperantisto). Estis amuzega vojaĝo! ★

– *Maki SANO*



## Verdaj amikoj

La Franca gazeto *Le Monde* de 12/02/81 sciigis, ke *Aleksandr Harkovskij, konata esperantisto kaj scienca jurnalisto veturas al Francio, kie li petos rifuĝstaton*. Tamen tio estis ĝusta nur parte.

Mi forlasis Moskvon por Vieno laŭvoje al libera mondo kun israela enirvizo enpoŝe. Kien mi veturos mi ankoraŭ ne decidis. En la viena flughaveno min atendis reprezentantoj de Usono, Israelo kaj kelkaj esperantistoj. Aŭstria policano klarigis, ke mi povus peti enirvizon de iu ajn lando, ne nur Francio. Tamen same esperantistoj helpis al mi fari la certan decidon. Unue mi vizitis preĝejon, kie diservo okazis en Esperanto. Poste al mi venis Renato Corsetti kaj Anna Brennan (Lowenstein). Renato montris al mi Romon kaj apudurbon, rakontis pri la vivo en sia lando kaj forte malkuraĝigis min elkloĝi en Italio. Anna akompanis min al E-radiostacio en Vatikano, kie mi amikiĝis kun kelkaj samideanoj. Ŝi konsilis al mi veturi al Usono. Anna kuraĝigis min pri mia angla. Kiam mi laŭdis la ŝian (ne sciante, ke ŝi naskiĝis en Britio), ŝi respondis, ke mia angla, nebona por Britio, sufiĉas por Usono.("Ĉu vi opinias, ke en Usono oni parolas bonan anglan?"). Ŝi malkuraĝigis al mi elmigri Brition, kaj Michel Duc Goninaz, mia amiko de 1957, diris la samon pri Francio.



Post tio telefonis al mi Isaj Dratwer, iam pola kaj tiam jam israela esperantisto: "Venu al Israelo." Kaj mi flugis al Jerusalemo. Bone ricevis min Dvojra Dwor el Natanja, Joseph el Tel-Avivo, konata verkisto Felix Roziner, kaj mia bona amiko, E-Profesoro Wolf Moskoviĉ. Al mi plaĉis Israelo, tamen, kiam mi volis tie elkloĝi, Isaj Dratwer diris: "Vi povus elmigri en Usonon kaj ne volas. Multaj revas pri tio. Vi estas freneza kaj nekuracebla." Kaj iu arabo aldonis: "Via juda Dio estas bona. Li liveras al vi Usonan enirvizon. Alaho ne estas tiom bona".

Tiuj homoj helpis al mi fari ĝustan solvon. Kiam jam en Romo, franca ambasadejo, laŭ mia antaŭa peto, proponis al mi enirvizon al Francio, mi konsentis veni Francion nur por vizito. La 03/11/82 mi alflugis al JFK kaj atingis Jersey City, kie atendis min preskaŭ senpaga duĉambra apartamento. Salajrata dejoranto ĉe "Novij Amerikanec", la unua, kiu telefonis al mi estis Mark Starr, (mi renkontis lin en 1969 en Leningrado) kaj li invitis min hejmen. Post tio mi vizitis miajn delongajn konatulojn gesinjoroj Manson, Julius Balbin (mi renkontis ilin dum la Universala Kongreso 1978 en Bulgario), kaj Jozefo Delpino. Kaj post veni al E-klubo en Domo de Amikeco en 41-a strato, mi vere eksentis min hejme. Veturoj al antaŭurbo en Tarrytown, paroloj kun Moŝe Levin, Leonardo Dzelzitis, Bill Orr, kaj aliaj helpis perfektigi mian anglan, kuraĝigis min. Julius kaj Betty Manson konatigis min kun homoj en judaj organizaĵoj, donis materialan helpon, kostumon, ĉemizojn ktp. Mi ekstudis ĉe CUNY, ankaŭ lekciis tie, ĉe MIT, A&M University (Texas), kaj nun profesoras pri ekonomiko en Turo College. Nenie mi sentis min tiom bone kiel en mia kara Novjorko. Kaj pro tio mi ŝuldas al miaj usonaj amikoj, al esperantistoj. Kiel mi redanku ilin? ★

– *Alex KARKOVSKY*
*(Aleksandr Harkovskij)*


## Dek jaroj de ESNY *(daŭras de paĝo 5)*

esperantistoj parolis en tiu biblioteko pri nia kara lingvo. En aŭgusto 1998 aperis artikolo en *The New York Times* pri Esperanto en Novjorko, en kiu estis intervjuataj Jim kaj Nancee Medrano. En oktobro de la sama jaro, aperis artikolo en la *Daily News* pri la instruado de Esperanto de Thomas Eccardt.

Dum la naŭdekaj jaroj, kelkaj el niaj membroj ricevis honorojn aŭ oficojn. Rochelle F. Grossman kaj Thomas Eccardt elektiĝis kiel estraranoj de ELNA en julio 1992. Rochelle elektiĝis kiel UEA delegito en septembro 1990. En 1995, Julius Balbin estis elektata membro de la Akademio de Esperanto.

**PROJEKTOJ**


Du projektoj dum la fruaj naŭdekaj jaroj estis butonoj kaj la statuto. Komitato komencis verki statuton en 1990, mi opinias; sed pro manko de progreso, alia grupo finis ĝin. En decembro 1993, la klubo voĉdonis akcepti la statuton, kaj nun ĝi estas legebla en nia hejmpaĝo. En 1990 nia Societo aĉetis malmultekostan maŝinon por fari butonojn kun sloganoj por Esperanto. Ni kreis stokon de butonoj kaj vendis multajn je 25 cendoj. Mi kredas, ke ni ankoraŭ havas la maŝinon, kaj povus krei novan stokon se la klubanoj deziras.




Dum la lastaj dek jaroj, du Esperantaj aferoj okazis en Novjorko tute sendepende de nia klubo. En decembro, 1992 okazis teatraĵo (workshop presentation) kun la nomo *Blindsight* (blinda vidado) pri la blinda Esperanta poeto Jeroŝenko. Se vi konas la spertulon Alex Karkovsky, vi scias, ke tiu blinda rusa poeto lernis la japanan kaj la Esperantan kaj verkis poemojn en tiuj lingvoj. Multaj niaj klubanoj ĉeestis la teatraĵojn. Alia "hazarda" afero estis, ke restoracio malfermis kun la nomo "Esperanto" iam en 1999. Plurfoje esperantistoj kunvenis ĉe Avenuo C kaj orienta naŭa strato por celebri aŭ por gastigi vizitantojn. Ĵus kiam ni retrankviliĝis pri la afero, alia kafejo adoptis la nomon Esperanto. Granda grupo de klubanoj renkontiĝis tie lastan someron.

**LA ESTONTECO**

Do, jen la novaĵoj el la lastaj 99 numeroj de *Novjorka Prismo*. Kio pri la venontaj dek jaroj? Mi opinias, ke nia klubo pli kaj pli uzos la novajn elektronikajn mediojn. Jam en 1996 Jim Medrano komencis meti numerojn de *Prismo* en Interretan paĝon. En 2000, mi starigis nian propran klub-paĝon: www.geocities.com/esperanto_nyc. Nun mi uzas ret-adresaron por kontakti kaj memorigi klubanojn pri niaj renkontiĝoj. Sed memoru, Esperanto estas parolata lingvo, kaj dependas de homaj klopodoj, ne de elektronikaĵoj. Do helpu verki la venontan historion de ESNY, iĝu aktivulo kaj laboru por Esperanto en Novjorko! ★



– *Tom ECCARDT*

